



La Blanka Rozo

Revuo de la
FEDERACIO ESPERANTISTA DE
YORKSHIRE KAJ HUMBERSIDE



N-ro 274

SOMERO 2016

LIVERPOLO: MAJSTROKLASO KAJ KONGRESO

Geoff Wood raportas pri ambaŭ eventoj.

Buchanan-Majstroklaso

Tion mi ĉi-jare ĉeestis por la unua fojo ĉe la Universitato de Liverpool 16a ĝis 18a de marto. Ĝi okazis en Foresight Building kiu estis tre oportuna kaj por la urbocentro kaj por la kongresejo de la Brita Kongreso kiu tuj sekvis ĝin.

Estis tri diversaj niveloj de kursoj por komencantoj, postkomencantoj kaj por Esperanto-parolantoj. Estis vere elstara grupo da prelegistoj kaj instruistoj:- Anna Lowenstein, Duncan Charters, anglo el Usono, Renato Corsetti el UEA, nia propra Paul Gubbins, kaj la bone konata gramatikisto Wim Jansen el Nederlando. La lingvoj uzataj estis Esperanto kaj la angla ĉar ĝi estis malferma al la publiko.

La temoj variis kaj estis dividitaj lau tri ĉeftemoj :- Esperanto (a) Lingvo, (b) Literaturo kaj (c) Kulturo. Ni audis pri la Literaturo de Zamenhof, Instruado de Kulturo, Claude Piron, Tradukado el la Hispana de iliaj beletroj, Edmund Privat kaj Milito, Kataluna Literaturo dum la Interna Milito, Instruado de Esperanto, pri la verkoj de Marjorie Boulton, Kalman Kalocsay, Julio Baghy kaj Forge. Ankaŭ ni aŭdis de la spertuloj pri tiklaj gramatikaĵoj kaj tradukaĵoj.

Bufedo de sandviĉoj estis provizita por lunĉo kaj estis paŭzoj matene kaj posttagmeze kun refreshigaĵoj kiujn ni vere bezonis post tiom da cerbumado. Entute tre valora afero kiun mi certe rekomendas.

Brita Kongreso

Tiu tuj sekvis la Majstroklason 18a ĝis 20a de marto, kaj okazis apud la Universitato. Mi, kiel multaj aliaj, prenis la okazon ĉeesti ambaŭ eventojn. La kongresejo nomiĝis Gateway Centre kaj kvankam ĝi estis iom "baza" ĝi bone plenigis niajn bezonojn kaj estis apud la urbocentro.

(daŭrigata sur paĝo 2)

TONY EDDISON †

Ni tre bedaŭras anonci la morton, je la 22a de marto, de nia karmemora samideano Tony Eddison. Tony naskiĝis en 1937 kaj kreskiĝis en Leeds. Dum juneco li deĵoris en la brita mararmeo. Tiu ebligis lin vojaĝadi tra la tuta mondo kaj forte influis lian postan vivon. Li laboris diversloke, i.a. kiel estro de benzinejo.

Tony estis modesta sed multflanka homo. Iam li transiris la Nordan Maron en eta velboato. El tiaj spertoj li havis stokon de anekdotoj per kiuj li regalis aliulojn.

Tony kaj sia edzino Joan multon kontribuis al Esperantaj eventoj en Jorkŝiro per bongustaj bufedoj, aparte ĉe nia ĉiujara seminario en York. Bedaŭrinde Joan ekmalanis kaj mortis en 2007; sed Tony fidele daŭrigis tiun laboron ĝis lia propra sanstato ne plu permesis ĝin. Li krome prizorgis nian 'senhejman' libro-kolekto en la kelo de sia domo.

Tony regule partoprenis niajn kunvenojn ĝis novembro 2013. Li estis ĉiam pacienca kaj bonhumora kaj mankos al ni ĉiuj. Niajn kondolencojn al familio kaj amikoj.

Jack Warren

(daŭrigata de paĝo 1)

Post registriĝo kaj kafo en la malfruposttagmezo ni ĝuis kvizon kaj tion sekvis prelego de Profesoro John Wells pri la loka dialekto "scouse" (skaus) kiu estis kaj amuza kaj eduka. Estis tre ĝojige vidi Johanon sur la podio denove post lia malsano.

Sabaton matene ni aŭdis por la unua fojo de nia gastparolanto (S-ro) Kalle Kniivilä. Li estas finna ĵurnalisto kiu multe vizitis Rusion kie li vidis multajn ŝanĝojn dum la jaroj. Li informis nin pri la aktuala pensmaniero de la enloĝantoj. Poste Hilary Chapman informis nin pri "la unua Esperantista romanistino" Edith Alleyne Sinnott kiu havis tre interesan vivon.

Post lunĉo alia vizitanto, S-ro Guilherme Fians parolis al ni pri sia hejmlando Brazilio kun lumbildoj. Sekvis Tim Owen kiu informis nin pri la fama frua pioniro Bolingbroke-Mudie kiu tragike mortis dum la Unua Mondmilito. En la vespero ni ĝuis ion pli leĝeran ĉar post kvizo pri "Beatles"- kanzonoj (neevitebla en Liverpool!) estis "Komedia Kvizo" organizita de Rolf Fantom.

Dimanĉon matene estis mallonga Diservo antaŭ la Jarkunveno de EAB. Feliĉe tiu okazis senprobleme, kaj aferoj estis priveditaj kaj balotoj organizitaj en profesia kaj glata maniero. Post lunĉo ni aŭdis pluan prelegon de nia finna vizitanto pri la nuntempa situacio de Rusoj el la Soveta epoko kiuj nun troviĝas en sendependaj ŝtatoj de Estonio, Latvio kaj Litovio. Helen Fantom parolis al ni laŭ la temo "Esperanto kaj Infanoj" en kiu ŝi tre elokvente kaj amuze informis nin pri siaj spertoj kun siaj tri infanoj, kiuj estas ĉiuj denaskaj Esperantistoj. Nia Prezidanto Jack Warren regalis nin per muziko kaj komuna kantado diversfoje dum la semajnfino.

En la vespero de dimanĉo la plimulto el ni renkontiĝis por Komuna Adiaŭa Manĝo en loka restoracio - tre ĝuinda fino al tre ĝuinda semajnfino. Dankon al ĉiuj organizantoj kaj kontribuantoj. Ĝis Edinburgo 2017!

La redaktoro komentis . . .

Majstroklaso: la gramatikaĵoj de Wim Jansen estis al mi tute novaj, kaj defiis mian pigriĝintan cerbon. Prelegantoj pri kulturo indikas, ke diversaj ideoj, normoj kaj malnormoj kunvivas sub la ŝirmo de unu lingvo. Aparte plaĉis al mi sesio pri poezio de Paŭlo Gubbins, kiu invitas partoprenon de la aŭskultantoj. Domaĝe, ke malmultaj liverpolanoj ĉeestis.

Brita Kongreso: la kongresejo konsistas el longa koridoro, laŭ kiu eblis facile orientiĝi. En la ĉambroj estas ĉio bezonata por sukcesa kongreso. Elstaraj estis la prezentoj de gastpreleganto ***Kalle Kniivilä*** pri mondopartoj, kiujn ni en Britio kutimas preteratenti. ***Guilherme Fians*** aliflanke parolis tro rapide kaj mallaŭte; efektive li ŝajnis pleje konversacii ol prelegi, do malgraŭ belaj fotoj prezentitaj de ĉarma homo, mi ne ĉion komprenis.

Tute profesie parolis ***Tim Owen*** pri Bolingbroke Mudie. Tim krome interligas unu programeron kun alia, glate kaj senlace, dum la tuta semajnfino. Verŝajne li postkongresis sur kanapo en malluma ĉambro. La kongresanaro multon ŝuldas al li. Ĉe 'mia' muziksesio mi apenaŭ bezonis gvidi, ĉar homoj spontane ludadis. Gratulon al ***Elizabeth Stanley***, gajninto de la Beatles-kantoj-konkurso per ero- kaj kostumo - tute gapenda.

Kaj fine . . . la ĵurnalisto kiu faris demandojn pri la EU-referendumo verkis artikolon pri la kongreso. Ĝi legeblas surrete ĉe <http://www.prospectmagazine.co.uk/features/the-language-that-never-was-esperanto-languages> .

- *El Nia Regiono* -

KONSILANTARO APROBIS HIDRAŬLIKAN FRAKASADON

Per sep voĉoj kontraŭ kvar ĉe kunsido de la planadokomitato, la Nordjorkŝira Graflanda Konsilantaro aprobis la peton de energikompanio *Third Energy* ekstrakti skistogason per hidraŭlika frakasado (angle *fracking*.) Tio okazos tuj apud la ferioparko Flamingoland en Kirby Misperton, Ryedale. Jen la unua tia aprobo ekde 2011, kiam similaj esploroj laŭ la marbordo Fylde, Lankasiro, verŝajne kaŭzis tertremetojn apude.

Protestantoj ariĝis antaŭ la konsilantara oficejo en Northallerton, el kie la diskutoj de la kunsido aŭdeblis per laŭtparoliloj. Ĉeestis i. a. anoj de la Amikoj de la Tero, la Verda Partio kaj premgrupanoj el Ryedale kaj aliloke en Britio. Ĉagrenis ilin tiu rezulto, malgraŭ la argumentoj de la multaj kontraŭuloj kiuj aperis antaŭ la komitato. Laŭ Vicky Perkins el la Konsilantaro envenis 4375 leteroj kontraŭantaj la peton kaj nur 36 kiuj subtenis ĝin.

Simon Bowens, kampanjisto por la Amikoj de la Tero en Jorkŝiro, priskribis la rezulton kiel 'falsaĵo.' Laŭ li la Konsilantaro ignoris la kontraŭon de la loka paroĥa konsilantaro, la enloĝantoj kaj komercoj. Li promesis daŭrigi la proteston, pro la riskoj por la medio kaj por la homa sano.

La brita registaro forte subtenas hidraŭlikan frakasadon. Laŭ energiministro Andrea Leadson ĝi kreas laborpostenojn kaj plifortigas kaj la ekonomion kaj nian energisekurecon. Protestantoj respondas, ke ĝi malpurigas la akvon kaj kaŭzas tertremojn, bruon kaj poluadon pro trafiko. Krome, serĉado de gaso - fosilia brulaĵo, kiel karbo aŭ nafto - ne kongruas kun la promeso de la registaro kontraŭbatali klimatsanĝigon per antaŭenigo de renovigeblaj energifontoj.

Gudrulo



Jack Warren kaj Rob Tucker, el la Middlesbrough-a grupo de la Amikoj de la Tero, staras inter la protestantoj en Northallerton je la 20a de majo.

REFERENDUMO PRI LA E.U. - ĈU RESTI AŬ FORIRI?

Se vi ankoraŭ ne decidis kiel voĉdoni, eble tiu konsilo - trovebla en diversaj versioj - helpos.

En paradizo: la franco kuiras

la angloj estas la policianoj

la italoj estas la amantoj

la germanoj estas la mekanikistoj

kaj la svisoj estas la organizantoj.

En la infero: la angloj kuiras

la germanoj estas la policianoj

la svisoj estas la amantoj

la francoj estas la mekanikistoj

kaj la italoj estas la organizantoj.

Sproto

(4)

Beletro

En nia numero de printempo 2014 aperis kvar poemoj de artisto kaj verkisto *Margaret Williams*, kiujn mi esperantigis por ŝi. Jen tri pliaj poemoj, kiuj hazarde ĉiuj rilatas aŭ al la nuna aŭ al apudaj sezonoj de la jaro.

Jack Warren

Preskaŭ Printempo en Middlesbrough

Laborspaco proksime al la ĉielo -
mevoj, komforte sur apudaj
kamenkapuĉoj, eksidas por digesti
sian predon,
la matenmanĝajn krustojn, kiujn ĵetis
la najbaro
sur sian garaĝtegmenton dum nigrablankaj
pigohordoj zigzagas, kverelas, batalas,
falatakas.

Ne estas iuj sonoj nun pli laŭtaj
ol la siblado febla de pluvo sur
la luka vitro, hazardaj ventekblovoj.
Eĉ la merlo, for malsupre,
eksilentas, fosas atenteme
en la musko por timigitaj oniskoj,
esperanta surprizi nesingardan lumbrikon,
kaŝanta sin tro alte sub surfaco.

Kvazaŭ poet' en laborej' silenta
serĉus iun nekapteblan vorton
inter la sonoj de grincantaj plumoj,
de susurantaj paperoj, preskaŭ suspiroj,
zumado neaŭdebla de sinkoncentrantaj
mensoj,
penantaj tuton fari el neatenditaj versoj.

La Priorejo de Guisborough

Trairinte la pordon en la muro,
ili trovis azilon; pagis por permeso
esti tie kune, bonvenigitaj de florbedoj
kaj molmaturaj ŝtonoj, benitaj
de la severa beleco de la ĥoreja arko.
Trankvilo - abrupte interrompita.
Zumanta impeto de streĉiĝo ĉirkaŭŝvelis,
Arda, elektra, sufokanta al ŝi la spiron.

Luktante ŝi serĉis vortojn, rokojn por ŝirmi
kaj sekurigi sin, alte super la ondoj
for el la kirliĝanta kontraŭfluo.

Maskita per ŝajno de normaleco,
sekrete ŝi forkaŝis sian veron,
enŝlosis sin ene de klostra ĉelo
kie kisi ŝin li povas nur tra la krado.

Malfrua Somero, Middlesbrough

Laŭ la ĉefstrato
subita sudlanda azilo
aperas ĉe la tilioj,
bonvena ombro en varmec' malvigla
sub bluaj ombreloj,
ĉirkaŭita de tondita bukso,
(sinteza, sed ĉu tiu gravas?)
begonioj, inter la hedero
ridetantaj, el supre,
lasta hurao de la jaro.

Malvarma vojflanka ripozejo
en kiu sidi, kun iu enmense
scivolante, ĉu tiu,
fore trans la maro
sammaniere sidas
malfruposttagmeze ĉe trinkaĵo
antaŭ si sur kromia tablo.

Enigmo

Pri kio temas en tiu poemo? La respondo -
unuivorta - troviĝas ie en tiu numero de via
revuo. Sciigu la redaktoron pri via
konjekto, kaj se tiu estas ĝusta, via nomo
aperos en la venonta numero!

Nomon mi havas, kaj mastro min regas.
Min li manĝigas, akvumas kaj flegas.
Irante kun bru' laŭ preciza horar'
Mi siblas alvenon al vojaĝontar.'
Rapide irinta, varmege mi estas,
Kaj dum longa tempo varme mi restas.
Se mi deĵoras, pri fulg' oni plendas,
Sed se elmontrata, mi miron atendas.

Sproto

Kuirrecepto -**Faba Ŝmirajo**

Tiu plado taŭgas aŭ por sandviĉoj aŭ kiel trempsaŭco por almanĝaĵo. La faboj (latine *vicia faba*, en la angla *broad beans*) estas sekigitaj, sed indas ankaŭ eksperimenti kun freŝaj aŭ frostigitaj faboj.

Bezوناتas: 150g da sekigitaj faboj
 1 verda cepo, hakita
 1 servokulero da olivoleo
 ½ tekulereto da salo
 suko el duono de limeo
 pipro kaj/aŭ herboj laŭ gusto

1. Trempadu la fabojn en malvarma akvo dum 8 ĝis 12 horoj. Kribru kaj forigu la ŝelojn.
2. Kuiretu la fabojn en akvo dum almenaŭ unu horo ĝis moliĝo. Kribru.
3. Metu fabojn en miksilon. Aldonu ĉiujn aliajn ingrediencojn kaj kaĉigu.
4. Servu kun toasto aŭ biskvitoj. Eblas konservi ĝin kelkajn tagojn en fridujo.

Jack Warren

EVENTOJ

Junio

10-12 Skota Kongreso, Pollokshaws, Glasgovo

25 Federacia Ekskursa Tago, York - vidu dekstre

Julio

23-30 **Universala Kongreso, Nitra, Slovakio**

Aŭgusto

13-14 Somerlernejo, Esperanto-Domo, Barlastono, Stoke-on-Trent

13-19 Dua tutkelta kongreso, Pluezek, Bretonio

Septembro

17 Nordokcidenta federacia kunveno, Ĉestro

Novembro

5 Aŭtuna federacia kunveno, York

Por pli da informoj pri tiuj eventoj iru al la EAB-retejo - aŭ kontaktu la redaktoron.

SOMERA**EKSKURSA TAGO**

Venu al York kaj ekskursu kun ni je sabato 25an de junio. Ni renkontiĝos, ne ĉe la klubo Guppy's kiel kutime, sed ĉe la fervoja stacidomo je 1.30 ptm.

El tie ni promenos al la apuda Nacia Fervoja Muzeo. Eniro estas senpaga. Tie eblas rigardi lokomotivojn el la tuta mondo, sed ĉiuj konstruitaj en Britio. En 2001 la muzeo gajnis premion kiel Eŭropa Muzeo de la Jaro. Bedaŭrinde la Ferris-Radego nun malmuntiĝis sed la muzeo ankoraŭ enhavas vastan gamon da elmontraĵoj.

Poste ni kaf- aŭ tetrinkos ĉe la kafejo sur kajo 7. Dume eblos partopreni du ĉetablajn ludojn. La lotludo taŭgas por komencantoj kaj progresantoj. Por pli spertaj cerboj, la Blufludo proponas pli grandan defion; necesas diveni, ĉu certa parolanto mensogas aŭ ne. Kompreneble estos premietoj!

Por pli da informo kontaktu la redaktoron.

**PRO MANKO DE LINGVA
 KONSCIO**

Tiu revuo jam plurfoje pritraktis la gravan rolon kiun ludis enlandaj interpretistoj por britaj kaj usonaj soldatoj en Irako. La brita ĵurnalisto Patrick Cockburn verkis libron pri la militoj en la Mezoriento. Anekdoto lia indikas, kion helpo de interpretisto povas signifi - kaj kio perdiĝas, sed ĝi mankas.


En iu loko apud Bagdado, angleparolantaj soldatoj malofte eliris siajn veturilojn kaj kutime ne uzis interpretistojn. Ili starigis kontrolpunkton, kie ili haltigis kaj priserĉis aŭtojn. Soldato petis kondukanton malfermi la kofrujon de lia aŭto. "*Mou mushkila,*" (neniu problemo) li respondis.

"Ne kontraŭdiru min!" krias la soldato.

Gudrulo

(6)

Krucvorteniĝmo



Indikoj

Horizontale: 8. Ekz. a, b, a, b, a, b... 9. Io aŭ iu adorenda. 10. Li ludis liron.
11. Pli alta ol baso (R.) 12. Litero cruciforma. 13. Deĵoras kun ŝlosiloj enmane.
16. Pinta monumento. 19. Vojaĝas. 22. Ataki ies reputacion. 23. Provizado de ekz.
pistoloj aŭ glavoj (R.) 24. Inter brako kaj trunko (R.) 25. Kiel reĝo aŭ reĝino.

Vertikale: 1. Uzata por glatigi lignon. 2. Kuiras malrapide. 3. Facile aŭdeblaj.
4. Salono, aŭ kuirejo. 5. Etulo kun strioj. 6. Tiel ekas rivero. 7. Ĝi varmigas,
por hejti aŭ kuiru (R.) 14. Malhela vulkana vitro (R.) 15. Ĝi protektas. 17. Permesi
enveni. 18. Tiel estas laŭtvoĉulo. 20. Komento (R.) 21. Franca rivero, enfluante
la Sejnnon. 22. Grupo de familioj (R.)

Solvo por Kvizo Jorkŝira en numero 273

1. Titus Salt, 2. Devil's Arrows, 3. Appletreewick, 4. Clapham, 5. How Stean, 6. Nappa Hall,
7. Whernside, 8. Bentley, 9. Delius, 10. Plumbo, 11. Henry Moore, 12. Gaping Ghyll,
13. Gouthwaite, 14. Stonegate, 15. Sulo.

Enigma - vidu paĝon 4!

La Blanka Rozo estas la revuo de la Federacio Esperantista de Jorkŝiro. Ĝi aperas trifoje jare: jarabono £6.00. **Redaktoro:** Jack Warren, 11 Linden Grove, Linthorpe, Middlesbrough TS5 5NF. Tel. 01642-82 76 79, rete: p.warren47@hotmail.co.uk. **Federacia Prezidanto:** Jack Warren. **Protokola Sekretario:** Gillian Cartledge, 175 Hunter House Road, Sheffield S11 8TZ. **Kasisto:** Angus Wilkinson, 59 Cross Hills Lane, Selby YO8 4RU. Tel. 01757 210375, rete: angus.wilkinson@sky.com.

